

ALVOKO PARTOPRENI EN LA 57-a ILEI-KONGRESO kaj SIMPOZIO



La 57-a ILEI-KONGRESO

Tempo: Ekde la 20-a ĝis la 27-a de julio 2024

Loko: Masejoo (Portugale: Maceió), Brazilo

Ĉef-temo de la Kongreso: “Esperanto por justa edukado”

Retejo de la Kongreso: <https://2024.kongreso.org/>

Ĉi-jare ILEI fariĝas 75-jara organizo prezentante grandan servon al nia instruistaro. Kiel ĉiuj scias, krom eldonado de du nepre necesaj-revuo (IPR kaj Juna Amiko), ILEI ĉiujare okazigas gravegan kongreson por ni, instruistoj, ne nur de Esperanto, sed ankaŭ de aliaj lingvoj kaj fakoj. Ni bonvenigas ankaŭ lernantojn, homojn, kiuj interesiĝas pri instruado, kaj ĝenerale ĉiujn esperantistojn de kiu ajn lingvo-nivelo

En 2024, la 57-a Kongreso de ILEI denove okazos hibride: virtuale kaj ankaŭ ĉeeste en la paradiza urbo Maceió (Masejoo), en la nordoriento de Brazilo.

La ĉefa temo de la Kongreso estos: “Esperanto por justa edukado”, kaj certe ĝi vekos la intereson ne nur de esperantistoj, sed ankaŭ de instruistoj de aliaj lingvoj kaj fakoj, universitataj esploristoj kaj profesoroj, ĵurnalistoj kaj ĝenerala publiko; unuvorte, ĉiuj, kiuj iel dediĉas sin aŭ interesiĝas pri la temo, aŭ ĝenerale pri pedagogio.

Ni atendas vian aliĝon kaj viajn kontribuojn pri la kongresa aŭ aliaj pedagogiaj temoj, kaj ankaŭ por la Lingva Festivalo, la Internacia Vespere aŭ aliaj programeroj. Vi povas indiki viajn kontribuojn por nia programo per la aliĝilo (<https://2024.kongreso.org/alighilo.php>) kaj/aŭ per retmesaĝo al: ilei.kongresoj@gmail.com.

La limdato por sendi ilin estas la 31-a de marto 2024, por ke ili estu aldonitaj al la Kongresa Programo. Por ĉiu via propono, ĉu prelego aŭ ali-speca kontribuajo, bonvolu sendi al ni (ilei.kongresoj@gmail.com):

1. titolon de la kontribuajo;
2. vian kompletan nomon;
3. daŭron de la prezentado;
4. ĉu vi prezentos ĉeeste aŭ rete;
5. du- ĝis maksimume kvin-linian priskribon de la kontribuajo;
6. du- ĝis maksimume kvin-linian biografion de vi;
7. vian foton.

Kiel kutime, vi povos ĝui ankaŭ ekskursojn, Lingvan Festivalon, spektaklojn ktp.

Vi trovos ĉiujn detalojn pri la aliĝo en la kongresa retejo: “2024.kongreso.org”

La ĉefa temo de la ĉi-jara **ILEI-Simpozio**, estos “**Lingvoj de instruado kaj justa edukado**”.

Venu plibeligi nian kongreson per via ĉeesto kaj aktiva agado. Via partopreno estas tre grava. Bonvenon!

Laura BRAZZABENI
ILEI-Estrarano pri kongresoj